

BULTENO DE REU

№ 84, Marto 2016



*Karaj, estimataj kaj amataj esperantistinoj!
Ni, la viroj de REU, elkore gratulas vin okaze de la Internacia Tago de Virinoj, kaj deziras al vi, ke nia printempe verda lingvo Esperanto konstante alportadu al vi ĉiam pli kaj pli da sukcesoj en ĉiuj kampoj kaj konstante vin feliĉigu!*

Invito al la kvina Internacia KER-sesio en Moskvo

Karaj geamikoj, la 16-an de aprilo 2016 jaro en Moskvo okazos vica skriba internacia KER-ekzameno. Partopreno en la ekzameno estas dezirinda kaj rekomendinda por kursfinintoj, parolantoj, posedantoj de la lingvo diversgrade kaj ankaŭ elemente. Aliĝi al la ekzameno eblas rete ĉe la paĝaro www.edukado.net kaj ankaŭ ĉe la ĉeforganizanto Svetlana Smetanina (rete svsmetanina@yandex.ru). La skriba parto pasos en bone ekipita loko, kie oni sidos po 1 persono ĉetable. Aliĝi eblos al la niveloj B1, B2 kaj C1. La ekzameno estas pagata, la mono estos ĝirota al UEA-konto. Kosto por la niveloj B1=17 eurojn, B2=19 eurojn, C1=21 eurojn. Kiu jam pasigis ĉi ekzamenon, povos aliĝi al pli alta nivelo. Kompleksan ekzamenon aŭ aldone la parolan parton eblos pasigi iam ajn en internaciaj aranĝoj aŭ UKoj. Post sukcesa ekzameniĝo, kies laboraĵoj estos kontrolataj en speciala Komisiono en Budapeŝto, oni ricevos internacivalorajn certigilojn en 4 lingvoj: angla, germana, rusa, Esperanto. En Rusio jam estas pli ol 100 ekzamenitoj, tio estas bona prestiĝo internaciskale pri lingvonivelo en Rusio. Bonvolu ne prokrasti la unikan okazon aliĝi kaj sukcese ekzameniĝi!

Akcepto de aliĝiloj kaj kotizoj estas ĝis la 20a de marto 2016j. Pri ĉiuj detaloj bonvolu turni vin al Sv.Smetanina.



Ĉu ILEI-sekcio en Rusio renaskiĝu?

Nome de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ni alvokas ĉiujn rusiajn esperantistojn-insruistojn apogi nian iniciaton restarigi rusan sektion de ILEI.

ILEI estas fondita en 1949. Ĝi unuigas homojn, kiuj instruas aŭ ŝatas/emas instrui la Internacian lingvon. ILEI havas proprajn revuojn – *IPR (Internacia Pedagogia Revuo)*

kaj *JA (Juna Amiko)*; havas propran paĝon en la revuo *Esperanto*. Ĉiu-jare okazas ILEI-konferenco (en Belgio en 2015 kaj en Hungario ĉi-jare). La organizaĵo disponigas riĉan kolekton de diversaj instru- kaj lernomaterialoj por instruemuloj, lanĉas diversajn projektojn, konkursojn, instrutrejnadojn kaj seminariojn

dum internaciaj E-aranĝoj kaj ekster ili. Pli detale vi povas konatiĝi kun la organizaĵo kaj ĝia agado en www.ilei.info.

Nun ILEI kalkulas 39 sekciojn en 38 landoj. Tamen inter ili forestas Rusio, (la sekcio estis nuligita pro malaktivado en ILEI-Konferenco en 2011 j.) kvankam en nia lando okazas multaj Esperanto-kursoj, inkluzive tiujn por junularo. Tio tute ne helpas, kompreneble, al la bona bildo pri Rusio flanke de la monda Esperanto-movado. Esperanto-instruado funkcias tute dise tra la lando, ne ĉiuj instruistoj emas doni informojn pri siaj kursoj kaj kursfinintoj. Malgraŭ tio Rusio okupas 5-an lokon en la paĝaro www.edukado.net laŭ kvanto de registritaj instruistoj.

Por restarigi la rusan sektion oficiale ĉe ILEI necesas havi minimume 5 membrojn. Espereble ni povas havi multe pli. Do, ni alvokas ĉiujn neindifirentajn esperantistojn: se vi volas disvastigi la Internacian lingvon kaj ĝian noblan rolon en la maltrankvila nuna mondo, aliĝu!

Dezirantoj, bv., adresi vin al S.Smetanina (svsmetatnina@yandex.ru) aŭ E.Nadikova (lena.espero@mail.ru)

Dankon kaj bonvenon!

*Elena Nadikova, Estrarano de ILEI (Cheboksaro)
Svetlana Smetanina, Reprezentanto de ILEI en Rusio (Moskvo)*

Eventoj

Vintra lingvotrejnado en Jekaterinburg

La Esperanto-aktivado en 2016 Jekaterinburg lanĉis per la Vintra lingvotrejnado, kiu startis la 3-an kaj finiĝis la 5-an de januaro. Al ĉi-jara lingvotrejnado – tritaga lernejo por komencantaj kaj komencintaj esperantistoj aliĝis 40 personoj, sed fakte partoprenis ĝin 31 esperantistoj el 13 urboj de Rusio kaj esperantisto el Korea Respubliko Kim Younung (Heroo), vojaĝanta tra Rusio per la Trasiberia fervojo. Plej ekstreme geografie situantaj urboj de la partoprenantoj estis en oriento Novosibirsk, en okcidento – Sankt-Peterburg. Sepdek procentoj de la aliĝintoj venis el Ural-Siberio. La trejnadon gastigis la sanatorio-ripozejo “Uktus”, situanta urborande de Jekaterinburg kaj disponiginta al la venintoj komfortajn kondiĉojn por loĝado kaj lernado.

La trejnado celis aktivigi lingvokonojn de Esperanto-parolantoj kaj evoluigi iliajn bazajn lingvokapablojn. En la leciontabelo estis gramatikaj, leksikaj, paroligaj lecionoj, rolludoj, kvizoj kaj konkursoj, klerigaj kaj distraj vesperaj aranĝoj. Entute okazis po 15 diverstemaj lecionoj en la grupoj A kaj B-nivelaj (konforme al la KER-sistemo), kiujn gvidis esperantistoj, posedantaj instruajn spertojn en la regiona, landa kaj internacia skaloj: Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg), Irina Gončarova (Odincovo), Olga Ŝilajeva (Glazov), Kirill Noviĉenko (Sankt-Peterburg), Tatjana Vŝivceva (Miass), Vladimir Opletajev (Surgut), Konstantin Ĥlizov (Jekaterinburg). Ankaŭ la lernemaj gekursanoj diversaĝis: de grizharaj okdekjaruloj ĝis la dek-tri-jaraĝa Filipp Vŝivcev el Miass.

Post la emocia malferma ceremonio estis okazigitaj unuaj kvar lecionoj, kiuj tuj entuziasmigis la kursanojn kaj instruistojn al aktiva kleriga kunagado. La organizantoj dediĉis multan atenton ne nur al la aktivigo kaj perfektigo de lingvokonoj, sed ankaŭ al la evoluigo de diversaj lingvokapabloj: aŭda kompreno, parolkapabloj (interagoj kaj kontinua formo), skribaj kaj kreaĵaj kapabloj, legokompreno; ĉion ĉi respegulas la varia temaro de lecionoj. Pluraj kursanoj estas jam sufiĉe malnovaj esperantistoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne tre aktive uzas Esperanton, sed ili deziris ĝui la vere paroligan kaj lernigan atmosferon de lingvaj okupoj, trovantaj kontinuan en vesperaj programoj, kiel ekzemple la “Amika vespero” aŭ “Novjarfesto” - gajaj, festaj, amuzaj kaj distraj.

El la prezentitaj raportoj kaj videoj menciindas la filmo de Kirill Noviĉenko pri la 100-a UK en Lillo, lia kleriga prelego “Esperanto estas ne nur lingvo” kaj interesa rakonto de la gasto Kim Younung (Heroo) el Koreio “Esperanto kiel ilo de mondvojaĝo”.

Fine ni ĉiuj sincere dankis la ĉefkunordiganton de la realigita instrua projekto Raja Kudrjavceva, kies fervoro kaj insistado estis gravaj premisoj por ĝia sukceso.

Vi povas konatiĝi kun la programo de la Vintra lingvotrejnado ĉe

<http://ural-sib.org/eo>, vidi fotojn ĉe

<http://vk.com/club59616356> aŭ <http://vk.com/lingvotrejnado2>

En la grupo "Esperanto en Surgut" en la socia reto "VK" ĵus aperis ĉarma bildfilmeto pri la okazinta Vintra lingvotrejnado, fare de Vladimir Opletajev. Vizitu la grupon "Esperanto en Surgut" laŭ la rekta ligilo: <http://vk.com/club59616356> kaj ĝuu la filmon!

Jen mi volas disdividi kun vi ankaŭ miajn pensojn pri Vintra lingvotrejnado.

Kiam Raja invitis min partopreni la lingvan trejnadon en Jekaterinburg, mi timis, ke pro la labora ŝarĝo ne povos trafi la eventon. Mi hezitis kelkajn semajnojn, sed fine decidis, ke mi vere bezonas refreŝigi miajn fortojn. Ĝismorte laca ĉevalo ne iras malproksimen.

Do mi aĉetis biletojn kaj veturis al Jekaterinburg kune kun mia lernantino Farida. La aranĝo okazis en la jam konata por multaj rusiaj esperantistoj komforta bazejo “Uktus”, rande de la urbo, en pitoreska pina arbaro.

La programo de tri trejnad-tagoj estis densega: du lecionaj partoj – matene kaj posttagmeze, vesperaj kulturklerigaj programoj, festoj, koncertoj, ludoj ktp. Aparte indas menciigi interesan lecionon de koreo Heroo (Youngung Kim) pri lia vivo kaj pri vojaĝo tra Rusio.

La lecionojn gvidis spertaj rusiaj esperantistoj, kiuj vere ravas min. Mi bedaŭras, ke pro la okupiteco kun la grupo A ne povis partopreni kelkajn lecionojn de B-grupo, interesajn por mi.

Ankaŭ grupo A min ravis. Homoj, kiuj komence de la trejnado preskaŭ ne parolis Esperanton (ekzemple mia lernantino Farida) en la fino de la trejnado jam senĝene esprimis siajn pensojn

en la lingvo. Ludante kun instruistoj dum la lecionoj, ili mem ne komprenis, kiam komencis paroli Esperanton. Similaj ludaj programeroj vere helpas al komencintoj, la rezultoj venas rapide kaj facile.

Por la grupo B mi reklamis la revuon de TEJO “Kontakto” kaj aranĝis kvizon pri la kajero 4:2015. Per la programero mi ŝatis paroligi lernantojn, krei pozitivan imagon pri TEJO kaj ĝia revuo, igi homojn esti aktivaj, verki, kreadi kaj partopreni projektojn.

Fine de la trejnado lernantoj ricevis certigilojn pri la sukcesa trejnado. Por multaj el ili tio estas la unua dokumento en Esperanto, vere grava kaj valora. Longa vojo komenciĝas per malgranda paŝo. Nome de ĉiuj partoprenantoj mi volas diri grandegan dankon al la ĉefa organizanto de la lingvotrejnado, Raja Kudrjavceva, kiu senlace, sendorme, sindone faris ĉion, por ke la evento estu alloga kaj pozitiva. Alian grandan dankon al Paŝa Veselov, kiu faris ĉiujn teknikajn (kaj ne nur) aferojn antaŭ kaj dum la trejnad. La lingvotrejnado certe pasis utile por ĉiuj. Dankon!

Olga Ŝilajeva

Nova Novjarfesta Novojarsko-2016



Novojarsko-2016 – nova novjarfesta Esperanto-renkontiĝo, organizita de siberiaj esperantistoj en Krasnojarsko, allogis 46 personojn, inkluzive de gastoj el Germanio kaj Hispanio.

La ideo pri ĝi aperis pasint-somere, kiam la tradicia Renkontiĝo de Amikoj (RA) okazis en Krasnojarska regiono. Multaj krasnojarskanoj delonge ne vojaĝis al Esperanto-renkontiĝoj, do RA venis al ili. Kaj ili aktiviĝis! Krasnojarskanoj invitis

la esperantistojn de Novosibirsko festi kune la Novan Jaron kaj eĉ elpensis la vorton Novojarsko: Novosibirsko +Krasnojarsko = Nova + Jaro.

Mi neniam festis Novan jaron tiel gaje! Ni manĝis, dancis, konkursis, amuziĝis, teumis, festumis, ktp. Al ni venis Avo Frosto! Ĉiuj ricevis donacojn. Nokte ni promenis al granda abio en proksima korto kaj dancis ĉirkaŭ ĝi. La 1an de januaro ni promenis tra la lumigita urbo al la ĉefa abio en la urbocentro.

Kvartagan paroligan kurson laŭ rekta metodo gaje kaj brile gvidis Rafael Mateos González. Por dezirantoj li gvidis ankaŭ kurseton de la hispana lingvo.

Ni vizitis la faman natur-rezervejon “Fostoj”, zoon, operteatron. Vespere ni kantis, ludis kaj amuziĝis ekstere. En unu vespero okazis koncerto de Aleksej Ĵuravljov, kaj alia estis Kristnaska vespero kun multaj aŭguroj. Interesaj kvizoj, preparitaj de Evelina Sokolova, tre amuzis gastojn.

Longe en Ruslando mankis vintraj Esperanto-aranĝoj, Novojarsko-2016 iĝis la unua post multaj jaroj. Mi dankas ĉiujn, kiuj venis, kaj diras: “Ĝis revido, karaj amikoj!” Nun mi scias, kiel mi volas festi festojn! Kune!

Katerina Arbekova

Ĉi tiu artikolo aperis en la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* (2016).

<http://sezonoj.ru/2016/01/novojarsko/>

Impresoj de K. Obrazcov pri Novojarsk-2016

Mi jam delonge revis pri Rusia Novjar-E-renkontiĝo: Antaŭ sep jaroj mi partoprenis la lastan IS kaj antaŭ kvin jaroj la duan JES ambaŭ en Germanio. Kaj al mi plaĉis la etoso, la ebleco forgesi ĉion kaj kune kun samideanoj festi kaj ĝoji la tempon dum kvin-ses tagoj (la renkontiĝoj komenciĝas kutime la 29-30-an de decembro kaj finiĝas la 2-3-an de januaro)! Tio ne nur estas interesa travivaĵo, indaj seminarioj, novaj kaj malnovaj amikoj, sed ankaŭ estas bona pruvo, ke Esperanto vivas!

Sed kiam en novembro 2015 mi eksciis, ke la renkontiĝo okazos en najbara urbo Krasnojarsko, mi pensis - jes, ni ankaŭ havos bonan renkontiĝon kiel import-anstataŭigilon (pro konstante kreskanta dolaro kaj eŭro nemultaj povas veturi ekster-landen)! Malgraŭ, ke la informoj kaj tagordo de la renkontiĝo ne estis tre precizaj, mi tre volis ĝin partopreni!!!

Bedaŭrinde mi ne sukcesis partopreni la renkontiĝon ek de la 31-a de decembro kaj vidi Avon Froston, sed la 2-an de januaro mi jam venis por ĝui koncerton de fama dum sovetia tempo Aleksej Ĵuravljov, kiu nun re-aktiviĝis kaj plenumis por ni kelkajn siajn kantojn - kaj la tradukitajn kaj proprajn en bona maniero kun akompano de Olga Bozina kaj Evelina! Post la koncerto mi kaj mia edzino Maria dum kelkaj tagoj kantis refrenon de nova por ni en Esperanto kanto, kiu estis traduko de iu forgesita sovetia kanto: "... krokodiloj, palmoj, baobaboj kaj edzin' de franc-ambasador'...".

Poste okazis multaj interesaj ekskursoj (al mi plej plaĉis ekskurso al natur-rezervejo Stolbi) kaj aliaj programeroj: diversaj ludoj (ĝis tre malfrua horo), komuna vizito al Krasnojarska teatro de opero kaj baletto por ĝui operon "Neĝulino" kaj rektaj kursoj de Esperanto kaj de la hispana far fama instruisto Rafael Mateos González!

Krom malnovaj amikoj mi renkontis dum Novojarsk multe da junaj komencantoj, por kiuj la renkontiĝo estis la unua (multaj el ili komencis lerni la Lingvon Internacian ekde oktobro 2015) - kaj mi vidis, ke la etoso de la renkontiĝo plaĉis al ili! Do laŭ mia opinio, estas bona pruvo por ili, ke Esperanto estas viva, utila kaj lerninda lingvo!

Resume: Mi ege volas partopreni la duan renkontiĝon kaj festi la sekvan Novan Jaron en bona kompani' !!! Se vi same deziras, bonvenon al Novojarsk!!!

Koĉjo (Tomsko)

Vespero, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto-poeto Konstantin Gusev



Ĉi jare ni festas 100-jariĝon ekde naskiĝo de la klasikulo de E-poezio Konstantin Mihajloviĉ Gusev. Al tiu evento estis dediĉita speciala programo en moskva klubo "Lev Tolstoj" la 10-an de februaro. Ne granda ĉambro plenis de gastoj, esperantistoj, familianoj de K. Gusev. La kunvenon partoprenis la filo de la poeto Viktor Gusev, lia edzino kaj la filo Ivan. La ĉefan rakonton pri la vivo, laboro, E-agado kaj poeziaĵoj de Konstantin Gusev prezentis kun multaj familiaj fotoj lia filo. Kun retenita spiro aŭskultis la partoprenantoj emocion historian de la vivo de la fama esperantisto, poeto, tradukisto. Viktor deklamis kelkajn ruslingvajn versojn de

sia patro, rakontis pri liaj amikoj, kolegoj, reciproka amo de siaj gepatroj.

Anoj de la klubo preparis rarajn versojn en tradukoj de K.Gusev. Viktoro Aroloviĉ, kiu el la ĉeestantoj la sola konis Gusev-on persone, laŭtlegis poemon de V.Majkovskij

“Al kamarado Nette, ŝipo kaj homo” kaj “Borodino “ de M. Lermontov. Konstantin Gusev tradukis pli ol 1200 paĝojn el verkaro de V.Majakovskij. Li multe tradukis ankaŭ el S. Jesenin, A. Puŝkin, M. Lermontov, L. Ukrainka, A. Voznesenskij, T. Ŝevĉenko, B.Pasternak. Estinte respondeculo en SSOD pri eldona agado li klopodis pri eldonado de kelkaj kantaraj kaj kolektoj de versoj. Konatas kantokolektoj “Kantoj de sovetaj respublikoj”, “Kantoj de niaj patroj”. Krome, Gusev majstre regis la hispanan lingvon kaj estis la unua, kiu tradukis verkojn de F.G.Lorka al Esperanto – pli frue, ol tion faris la hispanoj! Krome, li estis ankaŭ brila memstara poeto. Pri tio ege interese rakontis Nikolao Gudskov, li prezentis la libron “Moskvaj sonoriloj”, kie estis publikigitaj kelkaj originalaj poemoj de K.Gusev kaj deklamis unu lian soneton. Ludmila Novikova prezentis sian tradukon el unu originala rusa verso de K.Gusev, kiun tre alte aprezis la filo Viktor, ankaŭ ŝi rakontis pri sia vizito de la muzeo de K.Gusev en Voroneĵ, en la lernejo, kie la poeto studis. Bedaŭrinde, nun la muzeo ne ekzistas.

Reprezentantoj de juna generacio deklamis versojn de S. Jesenin “Betulo” (Aleksej Nistratov), “Velo” de M. Lermontov (Aleksandr Lebedev) kaj “Vero” de B. Pasternak (Ilja Muravjov). Kronis la vesperon tre agordita komuna kantado kun gitarakompano



de Mikaelo Povorin de kantoj en traduko de Konstantin Gusev: “Apudmoskvaj vesperoj”, “Katjuŝa”, “Jen viburno floras” kaj “Estu ĉiam la suno!” Post komuna fotado daŭris interparolado, demandoj, dankoj, bondeziroj. Estis prezentitaj raraj eldonaĵoj de V. Majakovskij k.a. La familio de Konstantin Gusev restis tre kontenta pri memorgespezo kaj ege dankis bonan organizadon. Ankaŭ ni kontentas pri tiu ĉi ĉarma, agrabla vespero.

Sv. Smetanina, iniciatinto de la aranĝo

VERO

Tradukis Konstantin Gusev

Dum krimalbenas vin envi'
Kaj klaĉo kalumnia,
Memoru: malamik' de vi
Por vi – mezur' nenia.

Ne rivalado pro l'estont',
Nek la duelo, certe:
Minacas al la tuta mond'
Obskuro eldezerte.

Sed super nigra polvnubar'
Ĝis la radioj sunaj
Plej altas vi – unika bar'
Al la ĉemizoj brunaj.

Superas vi de tiu hor'
Kiam en liberamo
Idolojn ĉiujn puŝis for,
Fratigis kun ĉiamo.

La malamiko havu vi
Da ŝrauboj, kupro, fero, -
Eĉ eron ne posedas li
De via granda vero.

1941

APERo-10 foriris, sed promesis reveni



La 20-23-an de februaro 2016 pasis en la apudmoskva ripozejo “Jerŝovo” APERo-10 – la Antaŭprintempa Esperanta Renkontiĝo, tradicie organizata de la Moskva Esperanta Asocio MASI, ĉiam en la samaj datoj kaj en la sama loko. Ĝin partoprenis 40 homoj, ĉefe el Moskvo kaj Moskva provinco (28), el la 12 aliregionanoj estis tri eksterlandanoj el Latvio kaj Francio. Inoj kaj malinoj, gejunuloj ĝis 30-jaraj kaj pliaĝuloj estis posamkvante. MASianoj, se alkalkuli la pasintjarajn ankoraŭ ne (re)aliĝintajn kaj la tri tute novajn, aliĝintajn dum la APERo, estis 21 homoj. La komencantoj kaj pene parolantoj estis 9 homoj (inter tiuj la tri gejunuloj, ankoraŭ ne finstudintaj ĉe FaRo-46,

kaj tri gastvizitantoj), do, la signifa plimulto flue parolis Esperante. Tia proporcio facile ebligas la taskon de la APERo – krei idealan medion por progresigi la lingvon. Krokodilado estas strikte malpermesata, kaj firmeco de la lingva disciplino povas konkurenci kun la varm-hejmecca amika etoso.

Programo de la jubilea APERo estis enorme riĉa, la ĝenerala temo “Sonoj” estis respegulita en multaj programeroj. La du plenaj tagoj ankaŭ havis temojn: Lingva Tago kaj Movada Tago. Prelegoj, kvizoj, ludoj, voĉlegadoj estis orientitaj al tiuj temoj. Ekzemple, “UNESKO-datoj: tago de la gepatra lingvo” (Kirill Noviĉenko, Sankt-Peterburgo), “Modernaj teknikajoj por tradukistoj” (Ilja Muravjov, MEA MASI), “La plej bazaj sonoj en lingvoj de la mondo” (Kuzjma Smirnov, Sankt-



Peterburgo, MEA MASI), “Kiel bestoj parolas” (Mikaelo Povorin, MEK “Lev Tolstoj”), “Sonoj de rusa avangardo” (Julija Samsonova, MEA MASI), “Franca literaturo en Esperanto” (Renee Triolle, Francio), “Divenu melodion” (Jelena Alopina, Petergof/Kovrov) kaj tiel plu.

La ŝatataj tradiciaj aranĝoj ne mankis: Konkurso de tradukistoj (Tatjana Stepanova, Sankt-Peterburgo, MEA MASI), Poezia

Horo, Librokruciĝo kaj Voĉlegado (rakonton de Artjom Kostjukovskij “Floso” voĉlegis 9 viroj), promenado en la bieno Troickoe kun fotado, koncertoj de Mikaelo Povorin kaj Sergeo Straŝnenko, dancklasoj (Jelena Alopina). Kiel ĉiam, abundis lingvaj kaj intelektaj ludoj: “Famulo” kaj “Serĉanto” (Mikaelo Povorin), “Kio, kie, kiam” (Georgij Kokolija/Oleg Ĉajka), “Ĉapelo” ktp.

El veraj specialaĵoj de la programo menciindas tri. Sufiĉe hazarde, sed por ni bonŝance, la APERon partoprenis la fama franca esperantisto kaj socia aganto Renee Triolle, dank’al kio ni havis programerojn pri la homaj rajtoj kaj interesajn kuluarajn parolojn. Dua temo estis prelegoj kaj diskutoj pri la tutmonda kaj rusia junulara E-movado, kiujn lanĉis la TEJO-sekretario Arina Osipova (Moskvo/Jekaterinburg), subtenata de TEJO A-komitatano Kirill Noviĉenko.


La tria specialaĵo estis la benefico de la poeto Klara Ilutoviĉ, kies jubileon ni antaŭnelonge celebris. Dum la benefico Mikaelo Povorin kantis 10 kantojn je la versaĵoj de Klara kaj 10 homoj deklamis ŝiajn poemojn.

Dum la Solena Fermo 20 homoj el 40 partoprenintoj ricevis Diplomojn pro la programkontribuo kaj unu – pro la organizado. Temas pri Aleksandr Basov, la sindona, akurata, ĉionpova kaj senlaca financisto, loĝiganto, teknikisto, mastрумanto ktp. La impresoj kaj dankvortoj estis tiom kortuŝaj kaj sinceraj, ke ne restas loko por duboj pri reveno de la APERo... Do, aperu inter ni la 23-26.02.2017 en APERo-11!

*Irina Gonĉarova
kunordiganto de MEA MASI*

Pli da informoj: https://vk.com/apero_ek_masi

Nova granda romano de Bruna Ŝtono



En eldonejo “Impeto ĵus aperis nova granda romano de Mikaelo Bronŝtejn “Mi stelojn jungis al revado”. Ĝi daŭrigas la serion de la romanoj, dediĉitaj al historio de Esperantomovado en nia lando. Ĉi-foje temas pri la tragika epoko inter 1918 ĵkaj 1938. La romano estas, certe, beletra verko, sed ĝiaj herooj estas la realaj historiaj personoj – famaj esperantistoj, kaj ĝi estas bazita sur serioza esploro de dokumentoj, abunde citataj en la teksto. Ĉiu, kiu interesiĝas pri nia historio, nepre devas tralegi ĝin. Pri tio, ke la legado estos por vi ne nur interesa, sed ankaŭ agrabla, atestas fame konata beletra talento de la aŭtoro.

Interesa fakto: la romano nun okupas la duan lokon laŭ la grandeco en la originala Esperanto-literaturo: ĝi havas 566 paĝojn (pli grandas nur “La granda kaldrono de John Islay Francis, kiu havas 692 paĝojn).

Libro de Jurij German eldonita en Belgio

En la belgia urbo Edegem estas eldonita de MAS (Monda Asembleo Sorta) nova traduko de konata tradukisto el Rusio Jurij Finkel. Temas pri la unua volumo el la trilogio “La afero, al kiu vi servas” de la populara sovetia verkisto Jurij German. Mem aŭtoro ŝatis sian romanon kaj asertis, ke la protagonisto de la trilogio kirurgo Vladimir Ustimenko enkorpigas ĉion plej bonan, kion li mem aspiris en la vivo.

Jurij Finkel esperantigis plurajn librojn el la literaturo de sovetia periodo. La liston de liaj tradukitaj verkoj vi povas vidi ĉe <http://www.esperanto.mv.ru/En> Krom tio li kreis kelkajn popularajn komputilajn programojn por Esperanto-uzantoj.

La tradukinto naskiĝis la 4-an de marto 1964 en Uljanovsk. Li estas diplomita inĝeniero-programisto. Laŭ propra mencio de Jurij, li konsideras sin konvinkita marksisto, ateisto kaj materiisto. La novan tradukitan libron ofertas la Libroservo de UEA <http://katalogo.uea.org/?inf=9251>

Rene Triolle en Moskvo



La 24-an de februaro la konata franca esperantistino kaj sociaganto, iama vicprezidanto de UEA Rene Triolle vizitis la Moskvon E-Klubon "Lev Tolstoj", kie ŝi interese prezentis diversajn temojn, inter cetere ŝi rakontis pri sia hejmgregiono (Provans). Dank'al la dematdo de Viktoro Aroloviĉ ŝi esprimis sian opinion ankaŭ pri APERo-10, kiun ŝi plentempe partoprenis, listiginte ĉefajn pozitivajojn de la aranĝo:

- abundo de gejunuloj,
- varieco de la programo,

- volonta kaj amasa kontribuo en la programerojn de la ĉeestantoj (eĉ la frua komencantino kuraĝas partopreni Tradukistan Konkurson).

Sekvontage ŝi kune kun grupo de rusiaj esperantistoj (Svetlana Smetanina, Mikaelo Ĉertilov, Irina Gonĉarova, Nikolao Gudskov) vizitis Unesko-komisionon ĉe la Ministerio de eksteraj aferoj de Rusio. Renee rakontis pri sia sperto de reprezentanto de UEA ĉe Unesco. Okazis vigla interŝanĝo de opinioj pri eblaj direktoj de kunlaboro inter REU kaj la komisiono.

Irina Gonĉarova

Nova membro de AdE en Rusio

La 17-an de februaro okazis laŭvica renovigo de la triono de la konsisto de Akademio de Esperanto. Inter la novelektitaj membroj por la sekvaj 9 jaroj estas moskva esperantisto Nikolao Gudskov. Li fariĝis la kvara akademiano, loĝanta sur teritorio de Rusio: la aliaj estas Sergio Pokrovskij (Novosibirsko), Paŭlo Moĵaev (Simferopolo) kaj Aleksandr Melnikov (Rostovo-ĉe-Dono). Krom tio, inter akademianoj estas du niaj eksaj samlandanoj, nun loĝantaj en Usono: Boris Kolker kaj Aleksandr Ŝlafer. Ni sincere gratulas la novan membron de AdE kaj deziras sukcesplenan poresperantan laboron!

Svetlana Smetanina



Nova E-kurso en RUDN

La 9-an de marto je la 19:00 en RUDN okazos enkonduka leciono por la 4-a studsesio de baza Esperanto-kurso. Lernantoj oficiale studentiĝas, havas aliron al infrastrukturo de universitato, ricevas elektronikan legitimilon por ĉiuj konstruaĵoj de RUDN. Fine de la kurso, sukcesintoj ricevas diplomojn de la federalnivela ŝtata universitato, kiuj estas agnoskataj de ĉiuj oficialaj instancoj en Rusio kaj en multaj aliaj landoj. Kosto de la kurso restas sur la sama modesta nivelo.

Aliĝi rajtas ajna deziranto.

Pliajn informojn eblas trovi en la retejo - <http://esperanto.su>

*Dima Ŝevĉenko,
Anna Striganova*

En Esperanto-gazetaro

Pri Esperantaj bardoj de Rusio

En la ĵus eldonita februara jagero de la revuo “Esperanto” estas publikigita en la rubriko “Esperantĵuo” tre interesa artikolo de Mikaelo Bronŝtejn “Plenigu l’korojn la muzik’...?”. La teksto estas verkita en la neripeteble individua rakontmaniero de nia konata rusia bardo-esperantisto. En la artikolo, posedanta la subtitolon “Kelkaj respondoj al la demandoj pri la Esperantaj bardoj de Rusio”, la aŭtoro prezentas proprajn rememorojn, provas skize resumi la kelkjardekan sovetian kaj rusian historion de barda kantado kaj respondas la demandojn: kial, kiam, kie, kiu estis pioniro inter aŭtoraj esperantistoj-kantokreantoj de nia lando. Fine de sia rakonto Mikaelo Bronŝtejn esperige kaj kredige emfazas: “En tiu ĉi mallonga prezenta artikolo mi ne rakontu ankaŭ pri nova generacio de talentaj Esperantaj bardoj, sed mi diru, ke ili multas kaj ili verkas.” Leginda artikolo.

Esperanto estas plej oportuna lingvo

Jen kion skribas en sia artikolo doktoro de filozofiaj sciencoj, katedrestro de Moskva ŝtata universitato V.P. Pugačov:

Пугачев В.П. Социальные трансформации в постсоветской России в свете стратегии глобального управления человечеством

.....В силу всего этого функцию языка мирового общения с гораздо большим успехом мог бы выполнить другой язык. **Наиболее демократичным и практически удобным для этого является искусственный язык**, например, эсперанто, изучение и использование которого имеет массу преимуществ перед английским. Изучить эсперанто (или другой) искусственный язык, построенный по простым и четким правилам, не представляет большого труда и для школьника, и для взрослого человека. Введение искусственного языка в качестве средства международного общения позволило бы людям во всем мире сэкономить массу времени и материальных затрат расширило бы возможности международных контактов, обогатило бы и демократизировало всю сферу международного общения.

Конечно, введение нового языка мирового общения требует длительного времени и учета интересов людей, профессионально занятых в сфере обучения английскому языку: преподавателей, переводчиков и т. п. Попытки сделать это ранее уже встречали и будут встречать упорное сопротивление со стороны США и проамериканского лобби. Однако блага, которые получит человечество от введения легкого для усвоения и удобного при использовании языка мирового общения, неизмеримо больше тех затрат, которые для этого понадобятся. Начать этот процесс можно было бы, к примеру, в рамках стран, входящих в БРИКС, в частности за счет преподавания в их школах (вместо иностранного или наряду с ним) в качестве обязательного языка мирового общения.

Использование легкого для изучения искусственного языка устранило бы языковые барьеры на пути общения самых разных людей: туристов, ученых, бизнесменов, обычных граждан, которые получили бы возможность стать реальными участниками международной жизни и мировой политики, понимающими друг друга и имеющими возможность самостоятельного, свободного общения. Принятие Мировым сообществом искусственного языка в качестве языка мирового общения способствовало бы гуманизации всей системы международных отношений, установлению демократического устройства мира, основанного на принципах равноправия и сотрудничества.....

http://e-journal.spa.msu.ru/uploads/vestnik/2015/vipusk_53_nojabr_2015_g/53_2015.pdf.zip%23page%3D6&hl=ru&sa=X&scisig=AAGBfm3qIC-OIMfA_m_iXzDtFu2khqd9jg&noss=1&oi=scholaralt

Ĝenerale, tre saga kaj legenda artikolo, inda pork e kun ĝi konatiĝu esperantistoj.

Informis Boris Kolker

Pri Esperanto en politologia artikolo

En artikolo de Valentin Seguru “МОЛДАВИЯ НА ПЕРЕПУТЬЕ: МЕЖДУ РОССИЕЙ, РУМЫНИЕЙ И ЕВРОПЕЙСКИМ СОЮЗОМ”, publikigita en grava armena retejo, aperis mencio pri Esperanto, kiu mirakle konserviĝis en la teksto malgraŭ ĉiuj mallongigoj far la redakcio: “Как в этом контексте не вспомнить замечательное творение нашего выдающегося соотечественника доктора Людвика Лазаря Замегафа, создавшего к 1887г. на основе общеевропейской лексики международный язык эсперанто – благозвучный, лёгкий по грамматике и, главное, политически нейтральный, т.е. не ангажированный. Язык, функционирующий в мире почти полтора века вопреки суровым ветрам современной истории.”:

http://www.noravank.am/rus/articles/detail.php?ELEMENT_ID=14431

Informis la aŭtoro

Vjacheslav Rojdestvenskij 75 jara!

Versa gratulo la chelabinska esp-veterano Viktor Laptev:

Niajn plenkorajn bondezirojn kaj varmajn gratulojn al Vjaĉeslavo Rojdestvenskij okaze de la 75-jara Jubileo. Salutpafado el ĉiuj kanonoj!!!

Niajn vortojn nun atentu, Vjaĉeslavo,
Ĉiam estas vi lumturo nia brava!!
“Kvara” venis jam duono de l’vivpeco.
La malĝoj’ en tiu tag’ ne estas deca!

*
75 - tio estas ne multe.
75 - vere tago tumulta.
75 - daŭras suno matena,
75 - tempo fluas sen peno.
75 - flugi alte Vi povas!
75 - movi monton Vi provos.

La humoro ankoraŭ ŝtormas,
Diableto en ripo ne dormas!
Vjaĉeslav’, laŭ la nobla aleo
Paŝu plu dum la jar’ jubilea!
La pokalojn plenigu ĝis rand’,
Kaj gratuloj voĉsonu en skand’!!



5.02.2016 V. Laptev

40 jaroj post forpaso de Kolomano Kalocsay

La 27-an de februaro 1976 forlasis nin KÁLMÁN KALOCSAY, la elstara eminentulo de la Esperanto-literaturo kaj lingvoscienco, membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA, honora prezidento de la Hungara Esperanto Asocio, ano de la redaktaro de Hungara



Vivo. Li laboris en la hospitalo de infektaj malsanoj en Budapesto. Kun Esperanto li konatiĝis en 1911. En 1922 Baghy, Kalocsay kaj T. Schwarz fondis la faman revuon “Literatura mondo”, kiu fariĝis la plej konata literatura arta organo de la Esperanta mondkulturo. Liaj plej valoraj tradukaĵoj estas Johano la Brava (epopea fabelo de Petőfi), La Tragedio de l’ Homo (drama poemo de Madách). En la eldono de LM aperis la “Hungara antologio”, kiun Kalocsay ne nur redaktis, sed la plejparton li mem tradukis.

Por Kálmán Kalocsay Esperanto estis arda pasio, por kio li laboris ĝis sia lasta spiro.

Li postlasis ankaŭ riĉan vivoverkon, tian spiritan valoron, kiun heredas la tutmonda esperantistaro.

Terézia Turányi

La Bulteno de REU (BdR) atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktotino 27.02.2016